

30^{an} Aprilo 1930.

Kara Amiko mia

Ĝojis mi vidante vian manskribon de nove. Sed, mi ne ĝojis legante pri la skarlatino de Eva. Estas tre malagraba malsano. Sed ĉe la nacioj kiuj ne estas anglaj, kutime ĝi estas malpli grava. La sango angla, strange, estas maltaŭga por tiu malsano + la angloj tre tre grave malsaniĝas je ĝi.

Mi supozas ke nuntempe vi estas pli kvieta anime pri via filino. Sendube vi ne revidos ŝin antaŭ kelkaj semajnoj ĉar estas tre longe.

Mia filo havis ĝin antaŭ 4 jaroj + li estis ĉe geamikoj kiuj bone flegis lin. Sed ilia filino + la kuiristino ankaŭ malsanis pri tio. Mia filo havis 42° Celsius + suferegis en la gorgo. Li estis malsana 6 semajnojn + ekresaniĝis dum 6 aliaj semajnoj en la kamparo. Estas pli grave kiam oni estas tiel aĝa. Estas pli bone havi ĝin kiam oni estas infano kiel Eva.

Kuraĝu, amiko + ne malesperu. Baldaŭ via Eveto estos kun vi + de nove gajigos vian vivon.

Estas terure pri S^{ro} Podhajsky - tiel rapide. Kiel oni estas vere malmulte sur tiu planeto + mi komprenas, ho kiom bone! tion kion vi diras demandante kial ni naskiĝis + ĉu estas por tiu celo.

Mia edzo estas ĉiam nervstreĉita pro multe tro da laboro + ĉiam li demandas la saman aferon. Por tiu celo mi laboras + vivas tiele? Li diras ke li ne povas ekŝiĝi ĉar la vivo kostas multe + li ne ¹ vivi pli simple ol nun. Sed mi estas tre tre malĝoja pri pli ĉar vere li ne devus esti tiel laca, sengusto kie li estas. Mi apenaŭ vidas lin + li estas tiel nervema. Li ludas golfon, dimanĉojn, sed li estas preskaŭ tro laca por eĉ tio.

En Augusto, mi devos iri al Cauterets (Pyrénéoj) dum 1 monato + mi esperas ke li venos ankaŭ + estos ripozo por li. La akvoj kuracas la faringiton kion mi ofte havas.

Dankon por via foto. Al mi ŝajnas ke mi vidas vin kiel vi estis en Antverpeno.

Dresdenon mi bone konas - estas belega urbo.

Mi eble revidos vin en Krakovo 1931 kie okazos la Kongreso + en Parizo en 1932. Mi ŝatus iri Krakovon pro rememoroj.

Dankon por via letero, por viaj bondeziroj pri viaj pensoj.

Mi forte esperas ~~ĉu~~ ke Eva tre tre baldaŭ resaniĝos + kie ŝia Patrino ne havu la saman malsanon. Estus pli grave por ŝi.

Nun, kara amiko, ĝis la baldaŭa letero. (Vi ne povos lasi min sen informo pri Eveto, ĉu ne?)

Esperu, estu pli gaja + ne forgesu vian samkongresinon.

Tut' korajn man'premojn

Alice Sergeant

¹ ĉu mankas la verbo "volas" aŭ "povas" ?